

Mensuel
Numéro 69
Novembre 2010

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

Oktobra evento :
SAT-Amikaro
aliĝas al APRIL !
Vidu p. 3

LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO

APRIL' semas
Aŭtun' rikoltas !

APRILeca staĝo
en Septembro



Gvidata de Phil, (kaj sub la rigardo de la nova konstanta montrofenestra deĵorantino) la staĝo pri instalado de Linukso - libera programo - kontentige disvolviĝis en la Pariza sidejo, kun multaj staĝantoj.

E-kuku !

Etaj ĉokoladaj molkukoj

Ingrediencoj por dudek malgrandaj kukoj:

- 4 ovoj,
- 200 gramoj da butero,
- 200 gramoj da ĉokolado,
- 200 gramoj da sukero
- 60 gramoj da faruno

Iloj:

Dudek-kaveta muldilo (kavetoj de 45 ml, 2,8 cm profundaj), aŭ dek-kvar-kaveta muldilo (kavetoj de 75 ml, 4,5 cm profundaj).

Seskaveta muldilo
el silikono.



Agmaniero:

1. Varmigi la fornon al 220 ° C dum 15 minutoj (turna varmo).
2. Almeti en ujon la buteron kaj la ĉokoladon, rompitan en pecoj. Fandi en kuirbano aŭ en mikroondo dum 3 minutoj (povo 360 W).
3. Aliflanke rompi ovojn kaj meti ilin en salatujon. Almeti sukero kaj energie kirli ĝis la miksaĵo blankiĝos. Almeti la farunon kaj denove kirli.
4. Kunmeti ambaŭ preparaĵojn, kirli la tuton. Elverŝi en la muldilon.
5. Enfornigi kaj kuiri je 220 ° C dum 9 minutoj por la 20kava muldilo, 10~11 minutoj por la alia modelo.

Atentu, la fornoj povas varii, do alĝustigu laŭ via forno!

Elisabeth Pichard



SAT-Amikaro



(Association pour la Promotion et la Recherche en Informatique Libre / Asocio por Promocio kaj Esplorado en Libera Komputiko)

De kelkaj tagoj, nia asocio aliĝis al franclingva asocio, kiu dediĉigas al promocio kaj defendo de liberaj programoj: April. De la komenco, la batalo por liberaj programoj similas al batalo por Esperanto: deziro de pli demokrata socio, rifuzo de premoj el egaj organizoj, senlima movado, batalo por egaleco, kulturo por ĉiuj, ktp.

Fakte, de pluraj jaroj, esperantistoj partoprenis en liber-programa movado. Dank'al tiu agado, nun multaj liberaj programoj estas disponeblaj en Esperanto: Ubuntu, Fajrovulpo (Firefox), OpenOffice, SPIP, ktp. SAT-EFK eĉ eldonis poŝtkarton kaj glumarkojn pri Linukso. Krome, SAT-Amikaro jam uzas liberajn programojn: la komputilo de la sidejo funkcias per Ubuntu, Firefox, OpenOffice, GIMP, ktp., kaj la retejo de nia asocio funkcias per SPIP.

Aliĝante al April, SAT-Amikaro indikis sian subtenon al batalo por liberaj programoj.

Prezenteto de April

Enkonduko

Pioniro pri liberaj programoj en Francio, April, kiu kunigas 5436 anojn (5001 ulojn, 435 kompaniojn, asociojn kaj organizojn), estas ekde 1996 ĉefa rolulo por la demokratigo kaj la diskonigo de liberaj programoj kaj malfermitaj formatoj al franclingvaj publiko, profesiuloj kaj institucioj. Ĝi ankaŭ intencas, en nova cifereca epoko, konsciigi al publiko danĝerojn pri ekskluziva inform-alproprigo de privataj intereso.

Konkurso

Nova emblemo por SAT-Amikaro

El pli ol 50 proponoj ricevitaj k publikigitaj en La Sago dum unu jaro (dankon al ĉiuj kontribuintoj), la komitato kribris la 10 plej trafajn, el kiuj la membraro referendume finelektos la plej ŝatatan (vidu la referendumilon, kies kodoj referencas al ĉi bildoj). Por ke ĉiu membro ne estu trudita elekti nur unu bildon forĵetante ĉiujn aliajn, ni decidis ebligi voĉdoni por pluraj.



Do vi disponas pri tri fakoj, la unua estas tripoenta, la dua dupoenta, la tria unupoenta. Finelektiĝos la bildo, kiu estos ricevinta plej multe da poentoj. Kompreneble la grafika kvalito estos re prilaborita (en rilato kun la aŭtoro) post la elekto, do gravas ĉefe la ideo (skize). Estis kelkaj motoj proponitaj: Langue sans frontiere, solidarite sans frontiere, Esperanto Langue pour tous. Pri ili ni tamen ne nun voĉdonigas, pensante ke ĝia indeco dependos de la emblemo selektita.

La komitato

(Vidu senkolorajn versiojn p. 6)

ĵus aliĝis al April

La asocio kunigas ulojn, kompaniojn, asociojn kaj organizojn el tre diversaj medioj, kiuj akordiĝas pri liber-programaj valoroj.

Celoj

April celas:

- Promocii** liberajn programojn al publiko, profesiuloj, asocioj kaj publikaj institucioj;
- Konsciigi** interesojn pri malfermitaj formatoj kaj intertrakteblo;
- Atingi** politikajn kaj jurajn decidojn por disvolviĝo de liberaj programoj kaj komunaj informajoj;
- Defendi** uzanto-raĵojn kaj verkistojn de liberaj programoj;
- Faciligi** disdividon de sciado kaj konoj.

Agado

- Konsciigi liberajn programojn al nova publiko;
- Informi politikulojn kaj promociojn progresman leĝaron pri IT (Informa Teknologio), patento kaj aŭtorrajtoj;
- Partneri en programkomitatoj aŭ ĵurioj («Solutions Linux», Paris Capitale du Libre, Trophées du Libre);
- Partopreni en organizado de Tutmonda Renkontiĝo pri Libera Programaro;
- Partnerigi kun institucioj (Francilia Regiono, Caisse des Dépôts), NRO-j (Fondation pour le Progrès de l'Homme),

publikaj entreprenoj (*Cité des Sciences, Université du Littoral*);

- Prelegi po ĉirkaŭ kvardek fojoj jare; Informi ĵurnalistaron pri agadoj;
- Partopreni en dudeko da eventoj jare;
- Ĉeesti en strukturoj kiuj influu je registara politiko (*Forum des Droits sur l'Internet, Conseil supérieur de la propriété littéraire et artistique*, ktp.);
- Konsciigi politikistojn kaj instituciojn pri transiro al liberaj programoj, kaj akompani ilin.

Teamo de April

April estas registita de komitato kun bonvolaj membroj kaj sajaritaj deĵorantoj.

April tra nombroj

- Pli ol 13 jaroj da agado (asocio kreita en 1996)
- 5436 membroj
- 5001 uloj
- 435 moralaj personoj kun:
 - 288 kompaniojn
 - 134 asocioj
 - 5 lokaj kolektivumoj
 - 8 membroj el eduka sektoro
 - 1 alia membro
- 3 deĵorantoj:
 - 1 ĝenerala delegito
 - 1 vic-direktoro
 - 1 komisiito pri publikaj aferoj
- Pli ol 4000 horoj da prizorgo

Trovu ĉiujn informojn pri April ĉe www.april.org.

Maksimiliano

Enhavo

- 1-3 [Kovrilpaĝo SAT-Amikaro ĵus aliĝis al APRIL](#)
- 2 [E-kuku Konkurso pri emblemo](#)
- 3 [Nekrologie](#)
- 4 [En nia leterkesto](#)
- 5 [Praktikaj informoj](#)
- 5-6 [Kiel traduki: «Suite»](#)
- 6 [Libro-Servo Konkurso pri emblemo](#)
- 7 **Supplément en français**
- 7 Raphaël Élizé
- 8-10 Dans la presse et ailleurs...
- 10 Cotisations 2011
- 11-12 La desupra ekologio kal la maldesupra...
- 12 [Vizito ĉe Prof. Statistikus](#)
- 13 [Libroj vivas pli longe ol unu sezono](#)
- 14 [Legindaj Legendoj](#)
- 14-15 [Pedagogio/recenzo Esperantistoj aktivas](#)
- 16 [Esperantistoj aktivas Ĉe la lago 69](#)

Atentu la suplementojn!

Resendu plenigitan referendumilon kun via abon-kotizo 2011 antaŭ la 31a de decembro.

Dankon!

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
Elizabet'	Barbay
	Filikino
Maksimiliano	Gverino
	JeanSeb
	Klod
	JoLo
	Ko
	Ĵak
	Le Puil
Jacques	Mabire
	Vito
	Markovo
	Guy
	Martin
	Line
	Maurel
Elisabeth	Pichard
	Jean
	Selle
	Serĝo
	Sir'
	Juliette
	Ternant

Forpasis Andreo Legros

La 10an de septembro 2010 forpasis Andreo Legros. Grupo da geamikoj ĉeestis la funebran ceremonion, la jaŭdon 16an en la tombejo de Bondio (*Bondy*).

Oni aŭdigis muzikon kaj kanzonojn en Esperanto. La milda voĉo de Nikolin sonis mallaŭte en la aero akompanante tiun adiaŭan momenton en kunesto de familianoj kaj amikoj.

Virino legis tekston skizantan la biografion de Andreo kaj tuj oni povis jam rimarki pri la intima rilato kiu ligis Andreon al Esperanto. Efektive, li lernis la lingvon junaĝe kaj ekde tiu momento li pensis ke dank' al Esperanto li povos realigi sian revojn pri paco en mondo ĵus eliĝinta el la dua mondmilito. Li fariĝis SAT-ano (SAT-n° 25791). Li ankaŭ aliĝis al SAT-Amikaro, kie dum multaj jaroj li aktive partoprenis en la komitato. Plej diversajn taskojn li plenumis i.a. li prizorgis, ĉiumonate, la preparadon de la banderoloj, sur kiuj aperis la adreso de la membroj, por la sendo de la asocia revuo. Tiu laboro, regula, sendanka, sen la modernaj nunaj eblecoj, deprenis de li

multe da tempo, sed li tion faris volonte, akurate. Li ankaŭ dediĉis tempon al la organizado de kelkaj kongresoj. Tiu de Bondio en 1990 estis vere sukcesa. En ĝi partoprenis grupo da junuloj, kiuj vere gajigis la etoson. Verŝajne Marcelo Redulez memoras pri ĝi, ĉar li eŝke animis ian ĝojigan kabaredon... Sekve de tiu sukcesa SAT-Amikara kongreso kreiĝis grupo en Bondio, en kiu Andreo rolis kiel prezidanto, sed kiam liaj fortoj neeviteble malpliĝis, tiam li devis forlasi sian aktivadon. La membroj de la Bondia grupo elektis lin kiel honorprezidanton (amuza afero... ĉar li ne ŝatis la "honorajn") Mi konis lin, modesta junulo, antaŭ 60 jaroj, li restis modesta homo dum sia tuta vivo.

Kelkaj inter la malpli junaj SAT-amikaranoj certe memoras pri li kaj pri lia senkondiĉa dediĉo al sia idealo.

Niaj amikaj pensoj iru al Cécile, lia filino kaj al lia frato, kiu tiel afable kaj amikece parolis al ni dum tiu malgajiga septembra tago.

Juliette Ternant

Pri esperantigo de propraj nomoj

Legante «la Sago»-n numeron 67, mi miras kial la revuo donas tian gravecon al tiu problemo. En la praktiko, ekster Esperantio, oni uzas la formon elektitan en la lando mem. Multe da propraj nomoj estas jam internacie konataj kiam temas pri gravaj urboj (ekz. en flughaven-indikiloj) kaj kiam temas pri la malpli konataj, prefere oni uzas la formon kiu aperas sur la mapoj por ne krei konfuzon (ekz. pri vilaĝo).

Krome, Esperantigo de la propraj nomoj starigas la malfacilan demandon pri kiu rajtas elekti la formon. Kiam pluraj estas proponataj por sama urbo, kiu elekti? Sed ne gravas, ĉar tio restas nur teoriaĵoj.

En praktiko, kiel iu ajn povas konstati sur la sama paĝo, la Esperantistoj mem tutsimple ne esperantigas proprajn nomojn, krom kelkaj kiuj insistas por esperantigi sian. Ni rigardu la rubrikon «Pratikaj informoj», kaj povas konstati ke nur kelkaj uzas Esperantan nomon. (Ĉi-teme ni omaĝu al Serge(ĝo) Sire(!) kiu pro kompromisemo ⁽¹⁾ aperas en ambaŭ formoj.) La urboj konservas la nacian formon. Nur landnomoj ŝajnas esti regule esperantigitaj.

Ankaŭ tiu metodo estas uzita en komputilaj sliparoj. Se oni legas la liston de la partoprenantoj al la lasta satamikara kongreso, oni ankaŭ povas konstati tion. Vidu: <http://www.esperanto-sat.info/article1616.html> (Cetere, oni miras kial tiu listo estas publika!?)

Se oni aplikas la principon, ke estas uzado kiu decidas kiun regulon apliki, oni povas formuli la regulojn tiele:

1. Oni uzu E-formon nur kiam ĝi nepras (kiam oni bezonas adjektivojn aŭ kunmetaĵojn, kiel por landnomoj) aŭ kiam iu nepre volas havi E-nomon

2. La koncernata persono aŭ lando (t.e. ties reprezentanto en E-movado) mem elektu tiun formon

3. Por personoj, oni konsideru tiajn E-formojn nur kiel pseŭdonomoj aŭ karesnomoj ne uzablaj por oficialaj aferoj.

Tiel teorio povas akordiĝi kun praktiko.

JeanSeb

Tute normalas ke La Sago dediĉas atenton al propraj nomoj, ĉar ĝi estas revuo de franclingvanoj esperantistoj (sed disvastigita ankaŭ eksterlande ĉe ne franclingvanoj!) k redaktita en Eo (k la fundamento en sia regulo 2 klare postulas, ke «Le substantif finit toujours par o.»). Ja ĉiuj senprobleme uzas la esperantigon Parizo por «Paris», do ne estas racia kialo kontraŭi, ke ankaŭ «malgravaj» urboj havu esperantan formon (komence apud sia origina por eviti konfuzojn, evidente, ĝis la formo plene fiksiĝis en la kutima uzado). Esperantistoj ofte batalas por la rajtoj de minoritataj lingvoj, sed kial ne por la rajto je Esperanta formo de minoritataj urboj?

La uzado (praktiko) ankaŭ havas tiun grandan avantaĝon, ke ĝi trudas per si mem la elekton, kiam estas pluraj

proponoj. Kaj ofte la parola praktiko estas pli trafa ol la skriba, ĉar voĉe ne eblas alkruciĝi al la ortografio! Ne senbaze Z proponis kiel 15an regulon, ke internaciaj vortoj estu transprenitaj en Eo per simpla (logike fonetika) skribo kun Ea ortografio (15a regulo de la fundamento) de la origina fonto.

En la rubriko «Pratikaj informoj», ni kompreneble aperigas neesperantigitajn formojn, tutsimple ĉar oni ne devigas la leterportistojn kompreni Esperanton... k pro ĝentileco (k foje spacomanko), ni lasas por homoj, kiuj ne ŝatas esperantigojn, krokodilajn formojn (kio ankaŭ reliefigas la fakton, ke ne La Sago mem kiel revuo tiom zorgas pri la temo, sed nur kelkaj kontribuantoj, kiuj ne trudas sian vidpunkton al aliaj!).

Pri la tri reguloj deduktitaj, mi emfazu, ke tio, se efektive spegulas la ĝeneralan praktikon, ankaŭ bedaŭrinde montras, ke esperantistoj, kiam ili renkontas vorton, pri kiu ili ne havas tujpretan konatan formon en Eo, ofte elektas transiri al la franca (do krokodili ĝin), anst. provi trovi eksternacilingvan solvon. Ne malofte dum diskutoj kun nefrancaj esperantistoj, mi simple ne komprenas kiun urbon oni mencias, ĉar oni provas eldiri ĝin laŭ franca maniero, k ofte la rezulto estas nerezonebla eĉ por franco kiu konas la aludatan urbon!

Ŝanĝi kutimojn estas malfacile. Sed ke plej multaj francoj forgesas la akuzativon ne signifas, ke ĝi estas senutila aŭ forĵetinda!

Markovo Vito

En nia leterkesto...

La ŝtelistoj de kokinoj

Ĉe la televido, la Prezidento, starante sur siaj altkalkanumaj ŝuoj, diskonigas ĉiujn bubaĉojn kiuj putrigas nian landon.

Per forta voĉo, per akuza fingro, li montras la responsulojn de niaj malfeliĉoj.

« Jes, estas tiuj ciganoj, vagemuloj, kiuj instalas siajn ruldomejojn ĉe la vojoj, ĉe malpuraĵoj, kiuj vivas sen akvo, sen lumo, sen mono. »

Mi studis la genealogiajn nomaron de tiuj mizeruloj. Mi asertas, ke neniu devenas nek de Karolo la Granda, nek de Ludoviko la 16a, nek ankaŭ de Napoleono. Se diri la veron pro la militoj, la dispartigoj de imperioj, la flosantaj limoj, oni ne plu konas la indentecon de multaj homoj. Tamen, iuj estis malpli eŭropanoj ol aliaj.

En mia infaneco, «maman Dadou», afable minacis min «la ŝtelistoj de kokinoj forprenos vin, se vi ne

manĝas vian supon!»

Hodiaŭ mi identigas ilin, ĉe niaj urboj, krom Neuilly kaj Cap Negre (iomete stranga, ĉu ne?). La viroj serĉas laboron, la virinoj lernejon por infanoj. Mi memoras la proverbon: «kiu ŝtelas ovon ŝtelos bovon, kiu ŝtelas du ovojn ŝtelos tri bovojn». Miaj karaj samcivitanoj, mia policano kondukas ilin eksteren de nia dolĉa Francio. Ili kunportas nek kokinojn nek ovojn nek bovinojn. Fermu televidilon, dormu pace, bonan nokton!

Sinjoro Prezidento, dankon pro via preteco!

Mi bredas nek kokinojn nek bovojn sur mia balkono, mi aĉetas ovojn en spicejo. Mi ne timas pri tiuj «eŭropaj eksterlandanoj»

Sed mi koleregas pri viaj demagogiaj kaj hataj paroladoj.

Line Maurel

Mi havis koŝmaron

-En la klaso, la instruisto, perdinte sian dentaparaton, balbutaĉis: tridek eraroj en la diktaĵo.

-En la laborejo: malsana pro Alchejmero, la esploristo konfuzis la varojn. Bum! la domo eksplodis.

-En la T.G.R., kun okuloj vualitaj pro katarakto, la gvidanto ne vidis signalon: bum! kolizio inter du trajnoj.

-En hospitalo, ĉar li ne ŝanĝis la piloĵojn de sia aŭdaparato, la kuracisto ne aŭdis alvokojn de malsanulo: la piloĵoj mortis, ankaŭ la malsanulo.

-En la strato: la policisto, pro tro da reŭmatismo, ne povis reatingi la ŝtelanton: kuras la bubaĉo, plu kuras li...

-Sidante sur trono, Nikolao la Unua kun siaj flatemulaj ministroj nenion vidis, nenion aŭdis: ili dormis, ronkis...Nikolao falis, la bruvo vekis min...

Sed ĉu la realo preterpasis la fikcion?

Line Maurel

Praktikaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-	Marde*	10h00 - 16h00 okaze
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 17h
		17h30 - 19h
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado: ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, **ĉiun ĵaŭdon**, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj **ĉiun vendredon** je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Trigrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

■ Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado: Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj: 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2011 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,50 €; Svisio: 5 F.S.; aliaj landoj: 4,50 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio: 32 €; Svisio: 43FS; aliaj landoj: 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro
CCP: 37 852 90 L La Source.

(Ĉekoj al la kasisto: Guy Martin)
IBAN, (por pagi el eksterlando):
SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314
BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Belgio:** Claude Glady:

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean:

Poŝta konto n° 23-14908-9.

La SAGO: Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto: Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Redakt- kaj korektskipo: Andreo Andrio, Francua' Dekurcelo, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Helpas al la korektado: Janine kaj Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Lino Markovo.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, **tekstoj** en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj prefere en Unikodo, bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir' (ne tajpitaj kontribuajtoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la tuj sekvanta numero.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe Guy Martin,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris
Tel.: 01 44 24 50 48

TTT-ejo: www.sat-amikaro.org

Reto: sekreario@sat-amikaro.org

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc
38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto: claud.gerlat@orange.fr

Claude Glady: Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean: Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Guy Martin: 3 rue Voltaire
22000 Saint-Brieuc

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto: lasago@free.fr

SAT

Abono al "Sennaciulo" 2011: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Kiel traduki Suite

■ La vorto **suite** estas uzata en tre diversaj lokucioj, kiuj respondas al same diversaj tradukoj.

Ce boulanger a pris la suite de son père. **Tiu panisto sekvis post sia patro.**

L'automne fait suite à l'été. **Post somero sekvas aŭtuno.**

Entraîner quelqu'un à sa suite. **Kuntreni iun post si.**

Il s'était fait prêtre à la suite d'un chagrin d'amour. **Li pastrigis sekve de amĉagreno.**

Il a bu trois verres à la suite. **Li trinkis tri glasojn sinsekve.**

Après sa commotion il a prononcé des mots sans suite. **Post sia komocio, li prononcis vortojn sen interligo.**

Il a un esprit de suite, il n'abandonnera pas. **Li havas persistecon, li ne rezignos.**

Avoir de la suite dans les idées. **Konstante strebi al sia celo.**

J'ai écrit quatre pages de suite. **Mi skribis kvar paĝojn seninterrompe.**

Et ainsi de suite. **Kaj tiel plu.**

Venez tout de suite. **Venu tuj.**

La pharmacie est tout de suite après le coin de la rue. **La apoteko situas tuj post la stratangulo.**

Voilà le roi avec sa suite. **Jen la reĝo kun sia sekvantaro.**

La suite du texte est abimée. **La sekvaĵo de la teksto estas difektita.**

Apportez-nous la suite (du repas). **Alportu al ni la pluajon (de la manĝo).**

Ne nous précipitons pas, attendons la suite. **Ni ne hastu, ni atendu la sekvon.**

La suite au prochain numéro. **La daŭrigo (estos) en la venonta numero.**

Saluton !

Mi elektis striptizon, por montri, kiel bildrakonto...

...uzas sinsekvon da bildoj kun tekstoj por esprimiĝi.



Daŭrigo postan paĝon



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40% ĝis 5€
 35% ĝis 10€
 25% ĝis 20€
 20% ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Par la suite il a enfin réussi.	Poste li fine sukcesis.
Un projet sans suite.	Projekto ne efektivigota.
Donner suite à un projet.	Efektivigi projekton.
Donner suite à la demande de quelqu'un.	Plenumi ies peton.
Les suites d'une maladie.	La sekvaĵoj de malsano.
Par suite de votre absence, vous serez puni.	Sekve de via foresto, vi estos punita.
Cet article est sans suite.	Tiu artiklo ne plu liveriĝos.
Suite à votre lettre du 20 décembre.	Responde al via letero de la 20a de Decembro.
Le droit de suite permet au propriétaire d'un bien de le revendiquer entre les mains de tout détenteur.	La sekvorajto permesas depostulian sian proprietajon el la manoj de ĉia tenanto.
Une suite de maisons identiques.	Sinsekvo da domoj identaj.
La suite des nombres premiers.	La vico de la primoj.
Dans une suite arithmétique, la différence entre deux termes consécutifs est constante.	En aritmetika vico, la diferenco inter du sinsekvaj termoj estas konstanta.
Dans une série géométrique, le rapport entre deux termes consécutifs est constant.	En geometria vico, la kvociento de du sinsekvaj termoj estas konstanta.
Une suite est une composition musicale faite de plusieurs pièces instrumentales de même tonalité.	Suito estas muzika komponaĵo konsistanta el aro da instrumentaj pecoj samtonikaj.
Prendre une suite dans un hôtel de luxe.	Lupreni apartamenton en luksa hotelo.

Andreo Andrio

Daŭrigo de la antaŭa paĝo:

La demonstro tiel sufiĉas, ĉu ne? Do ĝis!

Striptizo, ĉu?!? Ja virino kiu ne konstante strebas al sia celo!

Pli certe, vi timus la sekvaĵojn, ĉu ne?

konkurso

Nova emblemo por SAT-Amikaro

Jen la selektitaj emblemoj, sub nigra-blanka aspekto. (Vidu la koloran aspekton kaj klarigojn p.2)

Redakcio

- SAT-AMIKARO: A logo with a bird and a star, with the text 'ESPERANTO langue de la paix'.
- Internacia lingvo Esperanto: A logo with a stylized figure and a star, with the text 'SAT Amikaro'.
- esperanto, la internacie lingvo: A logo with a globe and a star, with the text 'Set Amikaro' and 'langue de la culture et de la solidarité sans frontières'.
- : A logo with a star and a figure, with the text 'SAT AMIKARO'.
- : A logo with a star and a figure, with the text 'AMIKARO'.
- : A logo with a star and a figure, with the text 'SAT-Amikaro Esperanto, langue sans-frontières'.
- : A logo with a star and a figure, with the text 'sat amikaro'.
- : A logo with a star and a figure, with the text 'esperanto'.
- : A logo with a star and a figure, with the text 'SAT-Amikaro esperanto, langue de culture et de solidarité au-delà des frontières'.
- : A logo with a star and a figure, with the text 'sat Amikaro' and 'ESPERANTO LANGUE INTERNATIONALE DE LA SOLIDARITE'.

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières



**Raphaël Elizé,
le pemier maire noir de France
était aussi un partisan de l'espéranto**

Ces années au cours desquelles Elizé exerça son mandat de maire furent une période faste pour l'espéranto dans cette petite ville. En témoignent ces extraits de la revue «L'espérantiste français»:

«Grâce à M. Eschenbrenner, un nouveau groupe a été créé à SABLÉ-sur-SARTHE» (mai 1934)

- «Ouverture d'un nouveau cours dirigé par M. Henri Micard, 30 élèves» (novembre 1934)

- **Une subvention de la Mairie de Sablé de 50 francs a été attribuée au Groupe Espérantiste de 1935 à 1938 pour «encourager l'enseignement de l'espéranto»** (Registre des Délibérations du Conseil Municipal de Sablé)

- «Le congrès annuel de la Fédération (Fédération Espérantiste du Centre-Ouest) a eu lieu à SABLÉ le 13 juin 1937»

- «Sablé-sur Sarthe - La section UNC (anciens combattants), divers syndicats CGT et le parti socialiste ont exprimé le souhait d'introduire l'espéranto dans les écoles: un exemple à suivre pour tous les groupes actifs» (juin 1938).⁽²⁾

Henri Micard, autre progressiste, à qui les espérantistes français doivent leur centre culturel du château de Grésillon, était instituteur à Sablé et l'on ne se trompera sans doute guère en supposant qu'il entretenait de bonnes relations avec Raphaël Elizé.


JoLoKo

C'est en 1929 que les habitants de Sablé-sur-Sarthe choisissent pour maire cet arrière-petit-fils d'esclave martiniquais.

Fidèle à ses idées progressistes, ce vétéraire socialiste oeuvre énergiquement pour améliorer la vie de ses administrés. Entre autres réalisations, on peut citer: création d'une cantine communale, aménagement d'un stade et d'une piscine ultra-moderne, chantiers pour chômeurs, création de la «Maison du peuple», et du «Collège du travail» etc.

Démis de ses fonctions par l'occupant allemand, il sera déporté à Buchenwald pour faits de résistance et y mourra en 1945.

Le registre des délibérations du conseil municipal permet de confirmer l'attachement d'Elizé à ses idéaux. C'est ainsi qu'on peut y trouver, en 1931, des voeux d'encouragement à la République espagnole naissante. Mais aussi et surtout, en date du 4 janvier 1938, où «**Il reconnaît qu'une langue de compréhension internationale facilitant les relations [...] entre les peuples est une nécessité chaque jour plus grande; que la langue universelle «Espéranto» a prouvé toute sa valeur pratique en de nombreux Congrès internationaux...Émet le vœu que l'enseignement de l'Espéranto soit encouragé et développé et introduit progressivement dans les programmes scolaires [...]**»⁽¹⁾ (nul doute qu'Elizé appréciera la circulaire ministérielle du 11 octobre 1938 par laquelle **Jean Zay** estime souhaitable de faciliter l'étude de l'espéranto en admettant son enseignement dans le cadre des activités socioéducatives).



N.B.: Sur cette période de l'entre-deux-guerres durant laquelle tant de grands noms ont écrit l'histoire de l'espéranto on consultera avec profit cet indispensable ouvrage de référence depuis peu librement accessible sur internet:

«Le mouvement international des travailleurs espérantistes 1918-1939»

<http://www.esperanto-sat.info/article1747.html>

Voir aussi:

http://fr.wikipedia.org/wiki/Raphaël_Elizé

http://fr.wikipedia.org/wiki/Jean_Zay

⁽¹⁾ **Remerciements** à José Gilabert pour ses recherches sur place. (nous lui sommes également redevables des photos ci-jointes)

⁽²⁾ On retrouvera le texte intégral de cette délibération du Conseil Municipal sur la photo ci-jointe. Citations de «L'espérantiste français» fournies par l'espérantiste-historien **Jean Amouroux** à qui nous exprimons notre gratitude.

■ Shinbun Akahata, journal du PC japonais, le 23 Octobre 2010, publie un article, dont voici la traduction:

«Faisons un putsch pour réformer la société avec nos petits-enfants qui cherchent du travail!» Cet haïku est un slogan que l'on pouvait lire au meeting «Putsch des retraités 2010», qui eut lieu à Tokyo et dans d'autres lieux au Japon, le 15 octobre 2010.

Nos petits-enfants ont de grandes difficultés à trouver un travail. Les seniors exigent l'abolition du système de santé des personnes âgées, qui est discriminatoire, et exigent une amélioration du système des pensions. Qu'ils défilent ensemble. Très bien! En avant!

A contrario, dans les situations réelles, on est confronté à une forte propagande, qui aggrave la concurrence entre les générations. «Il faut diminuer l'espérance de vie des vieux, sinon les jeunes devront payer plus d'impôts et de cotisations d'assurances.» «La vieille génération monopolise l'emploi et la jeune génération souffre de salaires bas ou ne peut pas du tout trouver de travail.»

L'origine de cette propagande est le monde de l'entreprise, qui veut diminuer les dépenses pour tenir la société.

Voyez les Français, qui s'opposent au projet de réforme des retraites proposé par leur gouvernement. Ils sont libérés de cette tromperie basée sur un soi-disant conflit de générations. Beaucoup d'étudiants et lycéens participent aux grèves et manifestations. Le gouvernement veut faire reculer l'âge de départ à la retraite et d'accès au versement des pensions. Bien sûr les travailleurs disent «Non!» Et les étudiants ont perçu que si l'âge de départ à la retraite des anciens recule, l'embauche des jeunes sera plus difficile; leur charge sera plus lourde; C'est ça la politique du gouvernement; Maintenant soulevons-nous avec les travailleurs contre le gouvernement! Les Français passent des journées à «faire un putsch pour réformer la société avec nos petits-enfants qui cherchent du travail!»

Un homme de lettres français, qui vivait au temps de la Révolution française, a dit: «Il y a peu d'idées. Mais l'idée de progrès de l'Humanité visant une société meilleure établit à elle seule la solidarité entre générations différentes.»

Traduit du japonais à l'espéranto par Tetu Makino, puis de l'espéranto au français par Vito Markov.

■ La Dernière Heure.be - 09 août 2010 - Internet et la Chine dopent l'espéranto (09/08/2010)

On croyait la langue internationale tombée en désuétude. Il n'en est rien

NAMUR: Le rêve fou d'une seconde



langue commune à tous visant à instaurer un dialogue interculturel entre les peuples – tout en sauvegardant et en respectant la langue maternelle de chacun – avait fini, au fil des ans, par être assimilé à une utopie.

Des associations actives à travers le monde continuaient, cependant, d'y croire. Des indicateurs concrets démontrent, aujourd'hui, que l'espéranto retrouve une vigueur certaine, et que ce n'est qu'un début...

Premier indice : l'attrait pour les méthodes gratuites d'apprentissage en ligne de l'espéranto ne cesse d'augmenter, particulièrement auprès des jeunes. Un succès qui s'explique par la facilité et la rapidité avec lesquelles on peut maîtriser cette langue comptant seulement 16 règles de grammaire.

Sans compter que la langue internationale espéranto constitue le chaînon manquant entre la Toile – fabuleuse ouverture sur le monde – et la difficulté pour la majorité d'entre nous de communiquer dans plusieurs langues.

Interpellant, également, le nombre de résultats – 34.400.000 – affichés pour le mot espéranto via le moteur de recherche Google.

Dans l'encyclopédie Wikipédia, l'espéranto se situe en 22e position sur les 269 langues répertoriées et classées selon le nombre d'articles publiés : soit 127.527 articles pour ce qui est de l'espéranto (statistiques de Wikipédia au 14 juillet 2010).

C'est néanmoins du côté de la Chine que l'on trouve le dopant le plus actif de l'espéranto. Une révolution qui se prépare depuis longtemps : cela fait plusieurs décennies que Radio Pékin émet en espéranto et que des cours d'espéranto figurent dans des programmes de formation

des enseignants.

Mais c'est depuis 2008 tout particulièrement que les signes d'une réelle émergence de la langue se révèlent au grand jour. Cela se produit lors du forum des langues qui se tient en Chine, à Nanjing. Alors que 70 langues sont représentées et enseignées dans des cours d'initiation, l'espéranto y est la langue la plus sollicitée par les participants, après l'anglais, et avant le français : du jamais-vu dans ce type de forum.

Autre signe de changement propice au développement de l'espéranto : la position de plus en plus intransigeante des Chinois face à l'anglais. Forts du développement de leur commerce extérieur, les Chinois commencent à exiger, lors de tractations économiques internationales, que la langue de travail soit désormais la leur, plutôt que l'anglais. Le chinois – plus précisément le mandarin – étant la langue qui compte le plus de locuteurs au monde et la seconde à être la plus utilisée sur Internet.

À cela s'ajoutent les initiatives mises en place dans l'enseignement avec des projets pilotes menés dans plusieurs classes d'écoles primaires : l'espéranto y est enseigné comme première langue étrangère. Dans certaines universités, comme à Nanjing – ville qui compte 6.000.000 d'habitants –, c'est le recrutement de professeurs étrangers capables d'enseigner l'espéranto, en sus de leur langue maternelle, qui est désormais favorisé.

L'éveil de la Chine va-t-il encourager le monde à communiquer sans suprématie d'une culture sur l'autre, plutôt que le faire trembler ? Une voie semble tracée...

Rosetta Flochon

Le même jour, paraissent trois autres articles de Rosetta flochon : *Le sésame du routard*, *Des ambassadeurs pragmatiques* et *Espéranto et médias*.



Da

El popola Ĉinio - 08 septembre 2010 - Vidéo : JT en espéranto !

El Popola Ĉinio publie probablement en première mondiale un journal télévisé tout en espéranto par des journalistes professionnels.



Liens :
▶ <http://www.youtube.com/watch?v=l5uF...>
▶ <http://esperanto.china.org.cn/>
▶ <http://esperanto.cri.cn/>

ns la presse... ...et ailleurs

DNA - 01 octobre 2010 - Nouveau cours d'espéranto

Dernières Nouvelles d'Alsace publie le 1 octobre un article intitulé **Nouveau cours d'espéranto**.

Article paru dans l'édition du
Vendredi 1 Octobre 2010



Nouveau cours d'espéranto

Pour la troisième année consécutive, dans le cadre des activités de l'association Art'Neuf, un cours d'espéranto se déroulera au RiveRhin de Village-Neuf.

Les personnes intéressées par la découverte et l'apprentissage de cette langue sont invitées à se retrouver tous les mercredis à partir du 13 octobre.

Avant la reprise des cours, deux sessions d'informations sont organisées : une première s'est tenue mercredi 19 septembre et la prochaine aura lieu le 5 octobre entre 18 h à 21 h au RiveRhin. Durant 30 mn, les visiteurs pourront assister à un mini cours audiovisuel, découvrir les livres, revues et rencontrer les espérantistes locaux.
« Alors les gens ...

S. Reibel

Source : <http://sitemap.dna.fr/articles/2010...>

Ouest-France - 20 octobre 2010 - Passage de relais à la présidence de « Pluezec esperanto » - Plouézec

Ouest-France publie le 20 octobre un article intitulé **Passage de relais à la présidence de « Pluezec-Esperanto » - Plouézec** [1].



Passage de relais à la présidence de « Pluezec-Esperanto » - Plouézec

Samedi, Roger Eon, président depuis la création de l'association « Pluezec-Esperanto » il y a 14 ans, a passé la main à Jean-Claude Dubois. Il continuera toutefois à s'impliquer compte tenu de la quantité et de l'importance des projets envisagés pour l'année.

Un bilan inespéré

Roger Eon est fier de son bilan : « Avec les rencontres internationales, on a réussi à créer à Plouézec un événement connu et reconnu dans le monde de l'espéranto. Lorsqu'on a commencé cette aventure, personne n'y croyait vraiment. Ce qui prouve que l'addition des volontés et des compétences permet de créer des choses inespérées ». Il a remercié les acteurs de cette réussite, « une équipe fiable, les trois soeurs, Héléne Caous, Jeanne Pouhaer et Marie Eon, Josiane Cado, la responsable de la logistique, les professeurs : Louissette et Jeanne, Odile Barbotin qui s'occupe des débutants... »

La relève

Jean-Claude et Héléne Dubois habitent Saint-Michel-en-Grève. Ils ont commencé à apprendre l'espéranto il y a cinq ans. Ils se débrouillaient en anglais et en allemand, ont habité en Afrique et aiment voyager. « On voulait connaître l'Asie et on savait que là-bas, on serait très limités pour discuter avec les gens. » Ils enseignent désormais l'espéranto. Ce sera parfait pour leur prochain voyage au Népal !

Des projets à la pelle

On fêtera en 2011 le 15 e anniversaire des rencontres ; les relations avec les espérantistes bretons seront développées ; un jumelage informel avec le Népal est en cours avec la participation de huit membres de l'association aux « rencontres himalayennes » en février ; une réflexion est menée sur l'écriture d'une charte des villages espéranto qui conduirait à la création d'un label.

Le maire, Jacques Mangold, soutient cette démarche : « Vous nous faites voyager. Pour une association locale, c'est rare d'être ainsi en lien avec des territoires si lointains ! »

Source : <http://www.ouest-france.fr/actu/act...>

[1] Dans l'article original apparaît la forme incomplète en espéranto "Pluezec esperanto" que nous avons donc rectifiée

Vimeo.com - Senmova : un court-métrage en espéranto !



Tugce Sen est une réalisatrice turque qui a choisi de réaliser son court-métrage en espéranto, les sous-titres étant en anglais. Ce qui fait donc un film original en espéranto, traduit en anglais. Peu commun, non ?

Synopsis : il s'agit de deux jeunes amies, Ismene, activiste politique, et la naïve Effie, non engagée, vivant sous un régime totalitaire, dans une époque indéfinie, où l'on parle l'espéranto. On est libre de choisir si l'on veut s'engager ou pas, mais peut-on déterminer les conséquences de ses choix ?

A propos de ce supplément en français...

Lors des derniers congrès, les réunions de travail concernant notre revue La Sago ont montré le désir majoritaire de conserver ce supplément en français, voire même de l'augmenter.

Une réunion exceptionnelle de travail s'est tenue le samedi 25 septembre au siège de l'association concernant La Sago. Cette réunion regroupait six personnes dont quatre membres de l'équipe de rédaction. La question du supplément en français a été le principal sujet évoqué.

En effet il reste un problème majeur: le poste de rédacteur spécifique est toujours vacant.

Les suppléments sont actuellement le fait principalement du rédacteur en chef et du maquettiste, mais d'une façon trop sommaire, pour des raisons évidentes de surcharge.

Le supplément mérite mieux, surtout s'il se veut une vitrine efficace vis à vis du public non espérantophone. Dans ce sens, il a été décidé de le publier en couleur à partir de janvier 2011.

Peut-être que cette amélioration d'aspect éveillera une vocation pour remplir le poste vacant ? Rappelons, que pour ce poste, il n'est pas nécessaire d'être un expert en espéranto, même un débutant peut s'en charger : il ne s'agit pas de traduire (d'autres s'en chargent) mais de regrouper des informations.

Serge Sire,
maquettiste de La Sago

Cotisations 2011

Avec ce numéro de La Sago, vous avez reçu le bulletin d'adhésion/abonnement 2011.

Les tarifs n'ont pas évolué mais quelques innovations y figurent:

- La cotisation minimale pour les adhérents à faibles ressources (cf LS 68).

- La possibilité d'adhérer à SAT-Amikaro sans s'abonner à La Sago. Cependant, cette revue officielle de notre association reste le lien privilégié entre ses adhérents.

Pour savoir si nous avons déjà reçu votre cotisation 2011, regardez votre feuille d'envoi de la revue (zut, elle est déjà à la corbeille !).

Lettre électronique

Pour les membres qui disposent d'internet, n'oubliez pas de consulter la lettre électronique sur notre site: www.sat-amikaro.org et inscrivez-vous pour la recevoir dès sa parution. La lettre n°4 vient de paraître.

Guy Martin,
Trésorier de SAT-Amikaro

Qu'est-ce que SAT ? Sennacieca Asocio Tutmonda: Association Mondiale Anationale, fondée en 1921, est une association mondiale de travailleurs et plus généralement de progressistes dont l'activité est centrée sur la culture et l'éducation populaire. Elle utilise l'espéranto comme langue de travail.
www.satesperanto.org

Qu'est-ce que SAT-Amikaro ? L'amicale de SAT: l'Union des Travailleurs Espérantistes de Langue Française, fondée en 1945, est l'association espérantiste de langue française qui s'occupe de diffuser et enseigner l'espéranto en francophonie dans les milieux progressistes et permettre ainsi l'accès à SAT.
www.sat-amikaro.org

Renseignements Pratiques

Permanence au siège

Lundi	17h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00 (non régulière)
Mercredi	14h30 - 18h00
Jeudi	15h00 - 18h30
Vendredi	09h30 - 17h00 puis 17h30-19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
- Les samedis** 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: <libroservo@sat-amikaro.org>

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE : Claude Gladys, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Novembre 2010.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Du konceptoj pri ekologio

Unua parto

La desupra ekologio

La demalsupra ekologio

En decembro 2004, okaze de intervjuo la tiama estro de la aŭtomobila kompanio *Renault - Louis Schweitzer* - deklaris, ke «la daŭrigebla disvolvo (franclingve *développement durable*) estas nek utopio nek eĉ kontestado, sed la kondiĉo de pluekzistado de la merkatekonomio».

Post la ekregado de la novliberalaj tezoj, la eksplodo de la financa tutmondiĝo kaj la laborista malfortiĝo de kapablo organiziĝi kaj kontraŭstari, de nun la daŭrigebla disvolvo estas uzata por hegemonia diskurso pri la vivmedio, dum la radikalaj proponoj de la politika ekologio ŝajnas esti kadukaj.

Kvazaŭ neniu politika programo flankklasas la daŭrigeblan disvolvon. La plej aktivaj subtenantoj de la instalita ordo (franclingve *ordre établi*) - multenaciaj kompanioj kaj ŝtatoj - publike montras sian kredon je la daŭrigebla disvolvo. En la jaro 2007, kvazaŭ ĉiuj kandidat(in)oj al la franca prezidenteco flegme subskribis «ekologian interkonsenton» prezentitan de animanto de grava komerca televida ĉeno, kaj kiu interalie anticipis la estigon de posteno de «vicĉefministro ŝarĝita per la daŭrigebla disvolvo».

Ekster la diskursoj, ekologia ekkonscio eĥiĝis en parto da homoj, kiu verŝajne montriĝas pli atentema al la kondiĉoj de produktado de konsumaj pere de bioproduktaĵoj aŭ justeca komerco (franclingve *commerce équitable*). Aperis sennombraj unuopaj aŭ pluropaj iniciatoj, ekologiismaj asocioj kaj partioj, sed la ekologiisma furoro trafis ankaŭ la industrion de konsumado, por vendi ekzemple ankoraŭ pli da aŭtomobiloj, kiuj «malpli konsumas».

En la nuna tempo, kiam la ekologia demando pli kaj pli forte eniras en la diskursojn kaj en la konscion de homoj, neniam la vivmedio estis tiom malbonstata: poluadoj, elĉerpiĝo de resursoj, klimata plivarmiĝo, dezertiĝoj, absoluta regado de la aŭtomobiloj, pulmaj malsanoj, vivmediaj rifuĝantoj... La listo de la manifestiĝoj de la vivmedia krizo estas kvazaŭ senlima.

Fakte, serio da ekologiaj katastrofoj (ellaso de toksaj gasoj en fabriko de kemiaĵoj en Seveso - Italio en la jaro 1976, pereado de la cisternoŝipo *Amoco-Cadiz* en la jaro 1978, ellaso de toksaj gasoj en parazitocida fabriko en Bhopalo-Hindio en la jaro 1984,

eksplodo en atomcentralo en Ĉernobilo-Ukrainio en la jaro 1986 k.t.p.) kondukis al serio da proponoj. La koncernaj proponoj aperis

sub la formo de relative koheraj kaj seriozaj diroj, kiuj estigis kunvokojn al internaciaj konferencoj, la kreon de ministrejoj kaj ĝeneralan transformadon de la publika agado. Aldoniĝis 3 subitaj trafiĝoj de la tutmonda petrolindustrio en la jaroj 1973, 1979, 1980.

Oni povas supozi, ke estas senpera rilato inter la ekologiistaj luktoj okazintaj dum la 1970-aj kaj la daŭrigebla disvolvo. Tamen paradokso estas evidenta. La unuaj pensistoj pri ekologio pledis por fundamenta ŝanĝiĝo de la vivmanieroj bazita sur memstareco, memadministrado kaj malcentralizo. La subtenantoj de la daŭrigebla disvolvo kontentiĝas per alia direktado de la ekonomio, por antaŭsavi la ekzistantan sistemon, tiel ke ĝi daŭros.

Fakte, ekzistas kontraŭeco inter 2 tipoj de ekologio: la desupra ekologio kaj la demalsupra ekologio. Tiu distingo memorigas pri kutimaj dirmanieroj uzitaj en la franca laborista movado en la 19-a jarcento, kaj tradukitaj de la usona marksista pensisto *Hal Draper* en la anglan lingvon per la terminoj *socialism from above* (desupra socialismo) kaj *socialism from below* (demalsupra socialismo).

Oni povas konsideri, ke la unua verko pri la desupra ekologio publikiĝis en Usono en la jaro 1948 kaj tradukiĝis en la francan lingvon sub la titolo *La planète au pillage* (la prirabata terĝlobo). En tiu verko, la aŭtoro *Fairfield Osborne* sisteme rilatigis la homajn aktivaĵojn al la vivmedia difektiĝo.

Fondita en la jaro 1968, la tiel nomata Roma Klubo havas la celon studi la homan aktivecon rigardatan kiel tutmondan sistemon, por solvi la naciajn demandojn. Ĝi konsistas el scienculoj, profesoroj, decidopovantoj el la tuta mondo. En la unua raporto pri ekologio prezentita al la Roma Klubo sub la anglalingva titolo *Limits to Growth* (La limoj de la ekonomia kreskado), la ĉefaj aŭtoroj *Donella* kaj *Dennis Meadows* esprimis la ideon, ke la nuntempaj ekonomiaj sistemoj konsumas nerenoveblajn resursojn, kies kvantoj estas limigitaj

en la skalo de la homa vivdaŭro. Aperinta en la jaro 1972, la koncerna teksto portas la nomon de siaj ĉefaj aŭtoroj, transigeblan en Esperanton per Medovsa raporto, kaj jene tradukiĝis en la francan lingvon: *Halte à la croissance?* (Ĉu haltigi la ekonomian kreskadon?). La Medovsa raporto montras teknokratitan koncepton pri ekologio kaj malfermis vojon al alia raporto farita en la jaro 1987, de la tiama norvega ĉefministriro *Gro Harlem Brundtland* al la UN-a Komisiono por Vivmedio kaj Disvolvo (anglalingve *World Commission on Environment and Development - WCED*). Tiu teksto estis anglalingve titolita *Our common future* (Nia komuna estonteco) kaj estis nomata Brundtlanda raporto. El ĝi fontas la dirmaniero «daŭrigebla disvolvo» aŭ «eltenebla disvolvo».

El tiu raporto fontas la UN-aj tekstoj ellaboritaj dum la konferencoj okazintaj en Rio-de-Janejro (Brazilo) en la jaro 1992 kaj Johanesburgo (Sud-Afriko) en la jaro 2002 kaj ratifitaj de kvazaŭ ĉiuj ŝtatoj. La tekstoj ellaboritaj de la Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaborado kaj Disvolviĝado (franclingve *Organisation de Coopération et de Développement Economiques - OCDE*) fontas ankaŭ el la Brundtlanda raporto.

Ĉiuj raportoj traktas la naturon per teknikaj kaj kvantaj terminoj, ekzemple «kvantoj da nerenoveblaj resursoj» aŭ «enlasa limo de la ekosistemoj», kio estas grava karakterizaĵo de la daŭrigebla disvolvo. La Brundtlanda raporto atentigas pri risko endanĝerigi la pluigon de la vivo (anglalingve *the survival of life*) sur la terĝlobo, kaj poste ĝi iom post iom glitas al la ideo pri pluekzistado de la nunaj manieroj vivi kaj produkti, tiel ke la daŭrigebla disvolvo ebligas novan eraon de ekonomia kreskado.

En la Brundtlanda raporto, la ĉefa difino de la daŭrigebla disvolvo estas jena: kontentigi la estantajn bezonojn, sen meti en danĝeron la kapablon de la estontaj generacioj kontentigi siajn proprajn. Tiu difino subkomprenigas antagonismon

De supra aŭ supra ekologio ?

Post tio, vi verde farbos ĉiujn formikojn kiujn vi trovos.

Jes, sinjoro la inĝeniero !



inter la estantaj kaj la estontaj generacioj en la senco, ke mankos en la estonteco tio, kion oni konsumas en la estanteco. Tiu etiko pri la estonteco havas fundamenton, kiu supozigas, ke la homoj kapablas respondeci pri sia agado. Laŭ aŭtokrataj kaj profunde elitemaj tendencoj de iuj pensistoj, la liberalaj demokratioj kaj iliaj hedonistaj homamasoj ne kapablas preni sur sin la estontecon de la homaro. En la demokrataj sistemoj, la alprenado de decidoj ĝenerale dependas de la ciklo de balotadoj (laŭ vicordo de 4 - 5 jaroj), kio malebligas adopti perspektivon en longa limtempo. Fakte, en la Brundtlanda raporto la nocio pri estonteco konsistas en simpla daŭrigo de la ekzistantaj strukturoj laŭ vivmedia oportuneco.

La pioniroj de la desupra ekologio estis scienculoj, kiuj turnis sin al la sciado akirita en siaj fakoj, por averti kontraŭ la malordo de la naturo sekve de la homaj aktivecoj. Poste, la daŭrigebla disvolvado aspektis kiel sciado kaj de tiam prezentiĝis sub la formo de sistemo de instruoj rezultantaj el kelkaj ĝeneralaj principoj. Laŭ la Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaborado kaj Disvolviĝado (OEKD) «institucioj, kiuj konvene funkcias, estus jam starigitaj kaj la realigo de daŭrigebla disvolvado necesigus nur la politikan engaĝiĝon, por apliki

klare difinitajn celojn». La Brundtlanda raporto, same kiel tiuj ellaboritaj en la 2 grandaj UN-aj internaciaj konferencoj pri la terĝlobo (en Rio-de-Ĵaneiro en la jaro 1992 kaj en Johanesburgo en la jaro 2002) kaj la tekstoj de diversaj internaciaj organizaĵoj, estas esence listoj de urĝaj farotaj aranĝoj, por «savi la terĝlobon». Ekzemple, la programo de la Agendo por la 21-a jarcento (komune nomata Agenda 21), adoptita de 131 ŝtatestroj en Rio-de-Ĵaneiro, entenas 40 ĉapitrojn, kiuj traktas pri demografio, scienco, edukado, regado k.t.p. Ĉiu el tiuj ĉapitroj arigas kvindekkelke da farotaj aranĝoj, por starigi la daŭrigeblan disvolvado: 147 por la protektado de la maro, 104 por la kampara disvolvado, dekkelke por la traktado de la radioaktivaj forĵetaĵoj k.t.p.

Prezentiĝanta sub la formoj de nepreco kaj scienco aŭ sciado, la daŭrigebla disvolvado konsekvence ne estas akordigebla kun la politiko rigardata kiel volo agi. Sur la kampo de la politiko, la subtenantoj de la daŭrigebla disvolvado asertas, ke ili estas nek dekstruloj, nek maldekstruloj. La OEKD rimarkigis, ke la malgrava politika engaĝiĝo de la ŝtataj altfunkciuloj ŝajnas kontribui al pli bona ekkonscio pri la daŭrigebla disvolvado. En la Brundtlanda raporto, la anglalingva

vorto managing respondas al «nova administrado», «pli bona administrado», «integrita administrado» kaj ofte aperas en la procezo de la daŭrigebla disvolvado. La teknikaj progresoj ebligis konsumi ĉiam malpli da energio danke la pli grandan energidonan efikon de la objektoj. Oni povas tamen supozi, ke la kreskado de la efikeco estos destinita por ampleksigo de la uzado de la koncernaj objektoj.

En la Brundtlanda raporto, klare estas dirite, ke la daŭrigebla disvolvado estas limigita per la stato de la teknologio, kiu implicas elpensojn, kiuj ebligas ekonomian kreskadon pli grandan kaj malpli detruan por la naturo. En alia maniero diri, tio signifas, ke devus esti pli da tekniko tie, kie ĝi malmulte ekzistas (en landoj de la suda hemisfero), kaj nova direktado de ĝi al konsidero de la vivmedio tie, kie ĝi estas impona (en landoj de la norda hemisfero).

Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la libro titolita *Les deux âmes de l'écologie - Une critique du développement durable*, verkita de la geografo kaj politikologo Romain Felli, eldonita de la firmao L'Harmattan (5-7, rue de l'Ecole polytechnique, 75005 Paris) en la jaro 2009.

Vizito ĉe Profesoro Statistikus

En nia antaŭa eldonaĵo, «Bonvenon en Manaĝerlando», ni promesis al vi, ke ni revenos al la temo de statistiko. Konsiderinte la kompleksecon de la temo, ni vizitis la plej faman francan fakulon, la himalajan eminentulon pri la temo, Profesoron Statistikus, inventinton de la teorio pri kreiva statistiko.

La profesoro estis interalie alvokita por konsultado, kiam la kolektaj procentoj de impostoj neatendite transpasis 100%, kio ne mankis okazigi la gravajn problemojn, kiujn vi imagas.

Profesoro, parolu al ni denove pri tiu delikata misio.

Tiu misio postulis de mi multe da tempo por kompreni la anomaliojn kaj poste redifini la parametrojn cele atingi rezultojn finfine kongruantajn kun komuna logiko. Mi tiam integris la fakton, kiel laborhipotezon, ke statistikoj ne spegulas realon, sed estas ŝajna, pli-malpli inventita realaĵo. Tiuj klopodadoj estis origine de kreiva statistiko.

Profesoro, statistikoj kaj indikiloj okupas kreskantan, eĉ vorantan spacon en

ĉiutaga administrado, por kio ili utilas?

El funkciiva vidpunkto, por nenio, krom por stresi la homojn.

Efektive la rezultoj ne estas fideblaj pro tio, ke ili dependas, rilate al elektitaj kriterioj, de antaŭdecidoj nepre diskutablaj je ĉiuj stadioj:

- * stadij de kolekto de datenoj, estas tro da proksimumadoj, eraroj, eĉ aranĝaĉoj, kaj la temoj, kiuj provizas ilin, estas sufiĉe lerte prezentitaj por kongruigi ilin preventive;

- * stadij de ekspluatado, egale;

- * kaj finfine, stadij de interpretado, aldoniĝas antaŭjuĝoj kaj intencoj de la leganto. La eminenta angla ministro Disraeli diris: «Estas tri specoj da mensogoj: etaj, egaj kaj statistikoj.»

Ĉu ne tie intervenas via inventaĵo, kreiva statistiko?

Tute. Anstataŭ ol iri en nuran direkton de dateno al rezulto, kun ĉiuj problemoj okazigitaj, ni plenumos per kreiva statistiko konstantan retraktadon de la tuta procezo, se la rezultoj ne kongruos kun la atendoj, eĉ, ĉelime, ni difinos rekte la rezulton. Kaj poste ni konstruos la ilon kaj la konceptan kadron servantan la celojn.

Tio estas pli racia, pli efika kaj resume, pli moderna, ĉar ni havos tiam veran

estrilon.

Sed tio estas malhonesta klopodado!

Tion oni ne diras pri opiniondoj, kiuj funkcias tiamaniere.

Sed trankviliĝu, kreiva statistiko ne ankoraŭ eliris el mia laboratorio.

M.D.

N.D.L.R.: Tiu intervjuo estas nura fikcio kaj ia ajn similaĵo al reala situacio, interalie al tio, kio estas uzita kadre de kunfandiĝo de maŝaroj, estus nur hazarda.

Tradukis el la franca Jacques Mabire el la sesa numero de la ĵurnalo de la Nacia Sindikato de la Inspektoroj pri Publikaj Financoj .



Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

ESPERANTO-KLASIKAĴOJ

ARGUS
(Friedrich Ellersiek)



Pro kio?

Internacia kriminalromano
originale verkita

MONDIAL

Pro kio ? Argus

Internacia kriminal-romano originale verkita

Berlin 1920, Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, 158 paĝoj. Nova eldono, ĉe Mondial, 8 €.

Pro kio?, Argus, Internacia kriminal-romano originale verkita, Berlin 1920, Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, 158 paĝoj. Nova eldono, ĉe Mondial, 8,00 €.

Mi havis la ŝancon, antaŭ proksimume 30 jaroj, aĉeti brokante tiun ĉi libron. Argus estas la pseŭdonimo de Friedrich Ellersiek. Kaj *Pro kio?* estas la unua «kriminala» romano en Esperanto. Kiel diras William Auld en *Vereco, distro, stilo*: «Tiu ĉi romano estas tipa el sia epoko, nek pli nek malpli bona ol centoj da aliaj.» Sed Auld ne parolas pri

centoj da aliaj en Esperanto, ĉar, kiam li verkis tion, en 1981, li kalkulis nur kvin originalajn krimromanojn! Kompreneble la situacio ŝanĝiĝis, kun la romanoj de Valano, S. Elgo, I. Nemere, R.C. Gates, k.a.

Do, mi ĝojas pri la reeldono de la unua, leginda se ne enda, krimromano en Esperanto. Mi konservis en la memoron du trajtojn, kiuj hodiaŭ ridetigas: unue pri la francoj kaj la vino (ja la romano disvolviĝas en pluraj landoj):

Intertempe ili estis alvenintaj ĉe hotelo Eden, kie ili bone matenmanĝis kaj trinkis botelon

da ruĝa vino.

kaj due pri la malmultaj aŭtoj tiuepoke!:

... Mi volis certigi min pri tio, ĉu la aŭtomobilo eble revenus.»

«Ĉu ĝi eble jam antaŭe, kiam vi estis en la hotelo povis esti reveturinta?»

«Ne. Mi estis sidiginta min antaŭ la hotelo, sur la teraso. Se dume aŭtomobilo estus veturinta tra Mentone, mi devus esti aŭdinta ĝin.»

Feliĉa epoko, kiam oni povis aŭdi «unu» aŭton kaj trinki vinon matene!!!

Sed ni daŭrigu kun William Auld: La detektivo estas ja policano, kriminal-komisaro von Merten, kiu havas sian helpanton kriminal-policanon Kruse, sed ili ŝajnas sufiĉe sendependaj de pli alta oficiala kontrolo. Von Merten ŝuldas al Sherlock Holmes sian deduktan metodon – kaj eble ankaŭ sian pligrandigan lupeon. Li alvenas al la krim-loko:

Merten singardeme fortiris la sakon de la tute nuda kadavro, kiun li atente rigardis.

«Nu, ĉu vi vidas ion rimarkindan sur ĝi?» demandis la urbestro, al kiu la afero ŝajne daŭris tro longe.

«La murditino apartenis al la unuaj klasoj de la societo, estis vidvino, havis bonan porvivon, lastatempe restadis aŭ almenaŭ antaŭ mallonga tempo estis en Sudeŭropo, laŭŝajne estas angliano kaj tre multe okupis sin pri verkistaj laboroj.»

«Ĉu ĉion tion vi povas vidi el la kadavro?»

«Eĉ tre klare. Vidu la bone flegitajn manojn kaj piedojn. Bone flegitajn manojn oni trovas tre ofte, sed zorgeman flegadon de la piedungoj nur en la plej altaj rondoj de la societo, jam pro tio, ke ĝi ĉiam devas esti farata de alia persono. Kaj jen, vidu!» Li kaptlevis delikatan, nigran fibreton, kiu elstaris inter la dua kaj tria piedfingro de la

maldekstra piedo, apenaŭ rimarkeble. «Kio estas tio?»

«Peceto da fadeno,» diris la urbestro, post kiam li atente estis rigardinta ĝin.

«Tute prave. Kaj el kia ŝtofo?»

«Tion mi ne scias.»

«El silko.» Merten tiris grandigan vitron el la poŝo kaj donis ĝin al la urbestro. «Ŝi do surhavis silkajn ŝtrumpojn, plia signo de ŝia klaso. Kaj nun rigardu la piedon entute, kion ĝi rimarkigas?»

«Al mi nenion, mi senkaŝe devas konfesi.»

«Escepte de la plando, ĝi nenie havas eĉ nur malgrandan malmoliĝon de la haŭto. Do la sinjorino ĉiam surhavis precize adaptitajn ŝuojn. Laŭ tio ŝi ne aĉetis siajn ŝuojn en magazeno, sed farigis ilin laŭ mezuro. Tio estas multe pli kosta, do parolas por tio, ke ŝi havis bonajn enspezojn, same kiel la silkaj ŝtrumpoj.»

Do nun ni komprenas kial, antaŭ kelkaj jaroj, iu franca deputito⁽¹⁾ aĉetis ŝuojn, kiuj kostis la duoblon aŭ eble eĉ la trioblon de monata minimuma salajro: li estis leginta ĉi tiun romanon!

Ĵak Le Puil

⁽¹⁾ Vidu (franclingve) «Affaire Dumas» http://fr.wikipedia.org/wiki/Affaire_Dumas

Selle humuraĵo



La scienco en provenca stardrinkejo.

Bedaŭrinde, oni trovis nur akvon sur Luno!

Estas eble, ke troviĝas pastiso sur Marso!



Legindaj Legendoj La atingebla Monto

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj.

Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

De ĉiam la koboldoj loĝis sur la Neatingebla Monto. Ili pace vivis sur la supraĵo ne ĝenante la najbarajn kamparanojn. Tial, kiam Antonio de Ville, komisiita¹ de la reĝo Karolo la oka, atingis la supraĵon kun skipo da helpantoj, ili estis surprizitaj. Tamen, ili toleris, kaŝe atendis kaj post unu semajno ili retrovis sian trankvilon. Ke ankaŭ unu ŝafgardisto² surgrimpis³ la monton post tri jarcentoj ne ĝenis ilin. Kamparano estas diskreta vizitanto.

En la jarcento dudeka, la situacio ŝanĝiĝis. La turistoj komencis pli kaj pli ofte viziti la nun atingeblan Monton. Foje, dimanĉe, estis kvazaŭa procesio. La grimpantoj abundis senĝenaj kaj ne silentaj.

La pacaj koboldoj ne protestis (ili ne havas sindikaton), eltenis kuraĝe kaj senbrue la invadon. Sed iam, tro estas tro, ĉu ne? ili ekkoleris⁴.

Ni, t.e. Meg, Jano, Pjero kaj mi, plezure alvenis sur la supraĵo en tre suna somertago. Ni babilis, manĝetis, diskutis pri la plej plaĉa vojo por desupri⁵. «Ha, ha!» interdiris la koboldoj, kaj ili jetis sur nin densan nubon. Ni miris. Ni des pli miris, ke niaj haroj vigle streĉe hirtiĝis. Ni sentis ian malkomforton, iom naŭzitaj de la elektra atmosfero. «KRAK» subite diris iu koboldo kun samtempa⁶ fulmo. «KRAAK» aldonis alia en dua fulmlumego⁷. Panik! Ni impetis senpripense⁸ kaj senŝnure⁹ en la «ordinaran vojon», speco de tobogano kun plurmetraj ŝtupoj. Ni saviĝis malsupren ŝirmate de la vertikala klifo. Piede de la monto, la somera suno trankvile radiis. Nur kotoneca nubeto kuŝis sur la supraĵo.

Klod

Notoj

Vidu en «La Sago» n° 66, «La neatingeblan monton»

Kiel emerita pedagogo kaj verkanto de bildrakontoj, tiu nova alvenanto en la libro-servo ne povis lasi min indiferenta, tiom pli ke ĝi ne multekostas (apenaŭ 6€) kaj sufiĉe bele aspektas. Tuj tamen tiklis min la uzo de «bildstrio» kiu laŭ PIV (kaj ankaŭ striktasense) signifas «bildrakonto konsistanta el nur unu strio» - kio estis ofte la kazo komence de la historio de ĉi ĝenro, sed kiu tute ne taŭgas por Tinĉaj albumoj.

Krom la evidenta kvalito de la aspekto, mi devas konfesi ke mi rapide tute senluziigiĝis, rilate multajn aspektojn.

- Rilate la uzon de bildrakontoj:

Bildrakonto havas du ĉefajn ecojn, nome la ĉeesto de tekstoj ene de la bildo, kiuj estas per si mem eroj de la bildo, kaj la arigo de la bildoj ordigitaj laŭ la disvolviĝo de la rakonto. La aŭtoro aludas al tiuj gravaj ecoj nur en la «klarigoj por instruontoj» kaj prezentas ilin kvazaŭ akcesore: «Oni povas rollegi la tekstojn de la vezikoj» «La teksto povas esti bazo por rolludoj». Sed en la lecionoj, ĉiam estas nur unu bildo, ĝenerale sen teksto, aŭ kun tre mallonga teksto. Unuopa bildo, plie sen teksto, bildrakonte havas neniun signifon. Fakte, la aŭtoro uzas la bildrakontajn albumojn kiel bild-bankon, el kiu li ĉerpas erojn por instrui samstile kiel en *Cours Rationnel* aŭ **Metodo 12**. Tion oni tre facile konstatas per la leciono «sporto», kiu baziĝas sur foto de la filino de la aŭtoro, altnivela

tenisistino pri kiu li tre fieras (certe tute prave) sed kiu havas eĉ ne la plej etan rilaton kun bildrakonto - tamen la leciono povis disvolviĝi samskeme.

- Rilate la metodon mem:

La metodo uzita sendube klasiĝas en la «rektaj metodoj»: troviĝas ja neniu klarigo en nacia lingvo. Gratulinda elekto: tiuj metodoj havas kiel avantaĝon direktiĝi al ajna lernantaro, kaj pli taŭgas por kutimiĝi al rekta penso en Esperanto. Ve, tiuj avantaĝoj plurloke misas pro mallertaj kiel ekzemple p.4: Sur la bildo maljunulino trikas. Demando en la leciono: «Kion faras la avino⁽¹⁾?» En la respondo estas enkondukita «trikiloj», bone. Sed kial tuj aldoni: «kudri per kudrilo; montri la horojn, la minutojn per montriloj» kio por franc-parolantoj nepre pensigas al homonimeco de «aiguille», dum por multaj alilingvanoj la rilato restos stranga. La celo anoncita en la antaŭparolo estas paroligi la lernantojn, ne instrui gramatikon. Mi ne vidas per tiu ekzemplo ke oni celas paroligi, sed male gramatiki, kaj plie per maltaŭga ekzemplo kadre de rekta metodo. Same pri ludkartaj emblemoj (sama paĝo), la teksto atentigas nin: «kero (ne konfuzu kun koro kaj ĥoro)» Ja kero kaj koro similas en multaj lingvoj, sed nur en la franca por ĥoro...ankoraŭ

Bondio (93 Bondy)

Raporto pri KULTUR MIKS'

Sabaton la 25an de septembro 2010, la diversuza salono de la urba Biblioteko Denis Diderot akceptis nekutiman eventon: La 2an KULTUR MIKS'on organizitan de la asocio Bondy-Esperanto.

Unue, temis pri defio: kunigi homojn parolantajn kiel eble plej multe da diversaj lingvoj kaj inviti ilin prezenti en kelkaj minutoj, sian lingvon kaj kulturon. Nu, malgraŭ la pluvo, kiu malpersvadis iujn anonciĝintajn personojn, ja ni ne elreviĝis ĉar la lastjara rekordo estis superita per 12 reprezentitaj lingvoj. La plej aŭdacaj homoj malkaŝis por ni kelkajn sekretojn de siaj idiomoj: Siranuŝ pri l'armena, Kazue pri la japana, Fratino Celina pri la malagasa, Jozefo pri la svahila, Helena pri la pola kaj Georgo pri la eŭska. La prezentoj, viglaj kaj altkvalitaj, bela vojaĝo tra la mondo, bonege bildigis la lingvan diversecon, ĝuste tiu kiun Esperanto strebas protekti. Vere interese!

Kiel duan parton, ni spektigis tri ĉapitrojn de la filmo « Esperanto estas... » kiu klarigas « la kialon kaj la kielon » de la internacia lingvo kaj evidentigas la vivantecon de tiu egaleca komunikilo. Indas precizigi ke - male al ĝenerala kredo - esperanto estas nun inter la plej uzataj lingvoj en la interreto. Cetere, pluraj retejoj proponas senpagajn esperanto-kursojn kies sukceso daŭre kreskas ĉe la gejunuloj kiuj ŝatas etpreze vojaĝi. Post mallonga plonĝo, far Ĵerar, en la (senesceptan) gramatikon kaj (perfekte fonetikan) prononcadon, Elizabet proponis ludeton dum kiu la neesperanto-parolantoj, el proponita listo de (netradukitaj) radikoj, tute trafe konstruis kunmetaĵojn: la bildoj, prezentitaj unu post alia, estis ekzemple « ter-globo », « nokto-birdo », « aŭtun-folio », « kosmo-ŝipo »...

Ni finis la posttagmezon babilante ĉirkaŭ kolacio, regalo de Bondy-Esperanto.

Elizabet Barbay,
prezidantino de la asocio

1	komisiita	La reĝo komisiis Antonion
2	Ŝaf-gard-isto	Ŝafgardisto gardas la ŝafojn
3	surgrimpis	grimpis sur...
4	ekkoleris	subite koleris
5	desupri	iri (de la supro) malsupren
6	samtempa	en la sama tempo
7	fulm-lum-eg-o	lumego de fulmo
8	sen-pri-pens-e	sen pensi pri...
9	sen-ŝnur-e	sen ŝnuro (por la sekureco)

La bildstrioj kiel lernolibroj de Michel Dechy

same p.6: «Kio estas la diferenco inter revu kaj sonĝi?», tio instigas referenci al la nacia lingvo, kion rekta metodo devas kiel eble plej eviti.)

- Rilate ĝeneralan kulturon:

Tre ĝenis min ke, laŭlonge de tiu libro, oni havas la impreson ke ekzistas nur Tinĉjo kiel bildrakonto. Krom unu paragrafo p.23 kiu aludas al bildrakonto ĝenerale⁽²⁾, ĉirkaŭ 15% de la lecionaj paĝoj estas uzataj por resumi ĉiujn tinĉjajn albumojn. Aldonu al tio tri paĝojn kun prelego de la aŭtoro, plu glorie al Tinĉjo - tio ne alportas multon al la celo «lernigi», ĉefe «paroligi». Cetere, la libro aludas nur al desegnitaj bildrakontoj, dum tute taŭgus samcele fotaj (aŭ miksoj) bildrakontoj.

Konklude:

Bonega ideo, sed bedaŭrinde sufiĉe malsukcese ekspluatita. Feliĉe restas ja unu bona kialo aĉeti ĝin: ĝi troviĝas en nia libroservo!

Serĝo Sir'


⁽¹⁾ Ĉu maljunulino nepre estas avino?

⁽²⁾ cetere kun eraroj: Nudpieda Gen, kvankam japana ne estas mangao; kaj kun mankoj: neniu aludo al la originalaj produktoj en Eo, de Arnaŭ ekzemple.



Rakontu la okazaĵojn - Kion ŝi diras ?

Jen ekzemplo de ekzerco pli ece bildrakonta kiun mi ŝatintus trovi, kiu povus multe pli utili por paroligi la lernantojn ol la albumaj resumoj, samtempe prezentanta fotan bildrakonton kaj la prestiĝan filon...



Parizo (75)

Ĉu la Diablo parolas Esperanton ?

Estis dum terura, malhela, fulmotondra posttagmezo; oni povis kredi la nokton jam alveninta. Dikegaj, nigraj nuboj ruliĝis en la ĉielo. Foje-foje, fulmobrilo flagris kaj oni aŭdis forajn muĝojn. La pluvo minacis.

Sur la granda pariza placo, sur sia kolono, ora anĝelo spitis la tondron.

Sur la granda pariza placo, homoj eliris metroon kaj, timantaj la pluvon, hastis.

Sur la granda pariza placo, sur makadamo, du homoj staris: junulino kaj viro.

Ambaŭ siaflanke vendis gazetojn, ambaŭ siaflanke vokis la pasantojn, kun kiuj ili parolis kaj provis vendi siajn gazetojn.

La ĉielo iĝis pli kaj pli nigra; por trankviliĝi la junulino kaj la viro interproksimiĝis kaj interparolis. La junulino klarigis, ke ŝi estas religiemega kaj vendas jehov-atestantajn gazetojn. La viro respondis al ŝi, ke li estas sendia, vendas anarkiajn gazetojn kaj interesiĝas pri Esperanto kaj parolas tiun sennacian lingvon. Ve! Horore! Kaj terure! La junulino rigardante lin naŭze, timeme foriris.

Poste la junulino parolis kun pasanto kaj, montrante la viron, diris laŭtege: «Ne parolu kun tiu estulo, li estas **LA DIABLO!**»

Do, ni havas la respondon pri nia demando: la diablo ja parolas Esperanton!

Filikino



Esperantistoj aktivas

Parizo (75)



Okaze de la naŭa «Nuit Blanche» (Sendorma nokto) - kultura evento organizita de la Pariza komunumo, kiu prezentas verkojn de nuntempaj artistoj en la publikaj lokoj kiel eble plej neatenditaj - la artistaro «Claire Fontaine» (Klara fontano) prezentas neon-ŝildojn kun traduko de «fremduloj ĉie» en kiel eble plej da lingvoj. Ĝis nun jam ekzistas 16 tiaj ŝildoj (ĉi supre la Esperanta). Necesas precizigi ke nepre la traduko entenu la ambiguecon: «Ni ĉie estas fremduloj» kaj «Fremduloj troviĝas ĉie»

Ĉartro de Bretonio (35 Chartre de Bretagne)

Invito al la aliĝantoj kaj aliĝontoj de SAT-Amikaro

La sekvonta kunveno de bretona SAT-Amikaro okazos la 27an de novembro 2010 je la 14a ĝis la 17a.

la loko: en la domo de Claude BROS,
5 rue de Bretagne,
35131 Chartres de Bretagne
(je 200 metroj de la poŝtoŝeĉejo kaj la urbodomo)

La tagordo:

1. la venontaj kongresoj de SAT Amikaro kaj SAT,
2. ĝisdatigi kursojn, eventojn, ...
3. rilatoj kun neesperantistaj movadoj en Bretonio (la sperto de ĉiuj),
4. kiuj agadoj por disvastigi la lingvon,
5. kiel varbi, informi la junajn laboristojn,
6. viaj ĉefaj zorgoj, ktp...

Ne ĉiu posedas komputilon, mi deziras ke vi diskonigu la inviton al esperantistoj kiujn vi konas. Dankon. Ĝis baldaŭ. Kore

Philippe Stride, La Jossais 22490 Pleslin
Trigavoutel 06.76.29.90.11 aŭ 02.96.27.87.43

Bonvenon al Filipo, kiu de jam kelkaj monatoj transprenis la perantecon pri Bretonio (post nia kasisto, Gi')!

Redakcio

PIAFado: Himno al (F)Amo

La 19an de oktobro pluraj lokaj asocioj okazigis amik-etosan renkontiĝon ĉirkaŭ ekspozicieto por ebligi lastfoje viziti k adiaŭ malmuntotan hejtfabrikon de la 19a pariza kvartalo, kiu de 50 jaroj per

sia alta kamentubo impone elstaris en la pejzaĝo.

Okaze de artista programo ellaborita ĉirkaŭ la temo «Vivi la Babelturon per kanzonoj», SAT-Amikaro do estis kontaktita de la asocio «Cafézoïde» por ke Esperanto estu reprezentita per kanzono de Edito Piafo (Edith Piaf) interpretita en Esperanto.

Du tagojn antaŭ la evento, ni trovis sur la reto lertan tradukon de plej fama Piafaĵo, nome la Himno al Amo (L'Hymne à l'Amour), far... japana SAT-ano, Konisi' Gaku'! Feliĉe FaMo tuj konsentis kunkanti kun Flonjo, kiam ni petis lin, k ambaŭ do dufoje havis la okazon kanti ĝin (post apenaŭ horduono da komuna provkantado!), k la duan fojon kun pli densa publiko aparte aplaŭdema al la duopo (aliaj kantis ĉiuj solule, en la franca, japana, itala, jida aŭ pola saman aŭ aliajn famaĵojn de «La Paser Bubino»). Inter la du kantadoj estis kelkaj prelegetoj, k la organizantino Anmaro (Anne-Marie) aparte insistis, por ke mi kelkvorte prezentu Esperanton, kies ĉeesto simbole tre gravis al ŝi dum ĉi interkultura vespero. Ŝi kiel zorganto de kvartala kafejo por geknaboj esprimis fortan deziron, ke ni starigu porinfanan kurson kadre de la asocio.

Markovo Vito



En novembro, la «Esperanto-Apero» okazos la 24an, en asocia kafejo «LeMoulin à Café» en la 14a kvartalo, ekde la 19a.

En decembro, ĝi okazos la 15an, en la asocia kafejo «La Commune libre d'Aligre», en la 12a kvartalo, ekde la 19a, kun speciala artista programo okaze de la Zamenhofa festo, kun FaMo!



ĉe la lago

far Sir'

kroniko pri la ĉiutaga vivo en Anci' Epizodo 69

Avineto ! Jen ni sur la "Am-Ponto".

Am-Ponto...

Tio pensigas min pri via patrino kaj ties sopiranto...

Ĉu vere gravas, ke vi lin superas en ŝak-ludo ?

Ĉu nur ŝak-ludo taŭgas kiel referenc-kadro en via ekzamen-sistemo ?

Kial ne selekti per anser-ludo ?

aŭ 421 ?

Ĉu mi komprenu, ke vi konsilas al mi, ludi la estontecon de mia patrino, - kaj de ties filino -

per ĵet-kuboj ?!?

